

POR VIA DISTRO

Unua problemo. — (20 poentoj)

En la ĉisuba teksto, bonvolu anstataŭgi la punktojn per la taŭgaj vortoj. Estas kalkulitaj po 2 poentoj por ĉiu vorto ĝuste trovita, sed estas forprenita po 1 poento por ĉiu erara vorto.

Pluan fojon, la nokto en mian koron, ... sur miajn rememorojn. Ĉiuj kanaloj, en la Okcidento, estas plenaj lakto kaj mielo. Mi ne scias maldoca kaj malluma likvoro enestas, male, en tiuj de l'Oriento. Mi enpeniĝas, senmove, ... la limo de la ombro kaj de l'haloj. Same la vojaĝemaj anĝeloj, mi mian mision. Venis la horo revojaĝi al mia patrujo.

Mi ankoraŭ rigardu vin, ĉielosata akvo, spegulo de la maltrankvilo, malĝoja kristalaĵo, tute opalsimila ĉe la tagiĝo kaj pli malluma, vespere, ... gagatornamaĵo.

Malsupre, en la fendo de la poldero, barko plata, kripla, glue sur la sunsubirejo, inter du karbaj nuboj. Maljuna boatisto, kun hokostango sur la, marŝas laŭlonge de la bordo.

Dua problemo. — Litera enigmo (10 poentoj)

1 vetero	9 vindi	17 brusto
2 kaliko	10 graso	18 poeto
3 terni	11 boato	19 korno
4 bireto	12 breto	20 pastro
5 sango	13 saluti	21 palaco
6 karato	14 lunĉo	22 turno
7 blato	15 barako	23 pugno
8 kareso	16 gusto	24 ofendi

Elprenu el ĉiu supra vorto unu literon tiel, ke la restintaj literoj, lasitaj en siaj antaŭaj lokoj, formu novan vorton. La elprenitaj 24 literoj en la numerita vico prezentos interesan polan proverbon.

Rimarko :

Car tiuj du problemoj estas la lastaj de nia konkurso 1965-1966, mi petas, ke ĉiuj konkursantoj bonvolu respondi al tri pliaj demandoj; tiujn respondojn oni kalkulos nur por dispartigi la eventualajn ekvalajnintojn.

- 1) Pri kiu lando temas la teksto de la unua problemo ?
 - 2) Kiu estas la aŭtoro (origina) de tiu teksto ?
 - 3) Kiu tradukis la tekston esperanten ?
- Bonan kuraĝon, kaj sendu viajn respondojn antaŭ la 31a de Majo, al :

Sro P. CHEVALIER

19, Bd Gabriel-Lauriol

44 - Nantes (Francujo)

AMUZAJ PROBLEMOJ

Solvo de la lastaj problemoj

La cirklo, kiu havas du centrojn :

CMD = 90°; do CD estas diametro.

CNE = 90°; do CE estas diametro.

Car estas du diametroj CD kaj CE pasanta per C, do estas du centroj. Tio estas neebla. Kie kuŝas la eraro ?

La cirklo kiu pasas per C, N, M pasas ankaŭ per I; la punktoj D kaj E ne plu ekzistas. Do unu sola diametro IC kaj nur unu centro.

La pilkoj :

Aritmetika solvo. — Se oni pagas 20 centimojn malpli por ĉiu pilko, por 15 oni pagas : $20 \times 15 = 3,00$ frankojn malpli. Tiu sumo permesas aĉeti 5 pliajn pilkojn. Do ĉiu pilko kostas $3,00 : 5 = 0,60$ centimojn. La unua prezo estas do : $0,60 + 0,20 = 0,80$.

Algebra solvo. — Estu « x » la unua prezo de unu pilko. La dua prezo estas $x - 0,20$.

$15x = 20(x - 0,20)$; $20x - 15x = 400$; $5x = 400$
Do $x = 80$.

NOVAJ PROBLEMOJ (S-ro Jarlier).

La miksaĵo : Cent litroj da iu vino kostas 150 frankojn. Cent litroj da alia vino kostas 135 frankojn. Laŭ kiuj proporcioj oni devas miksi la du vinojn por ke cent litroj da miksaĵo kostu 140 fr.

Kompletigu :

.84 ...	8.
..	1...9
34	
34.	
...	
..	
...	
...	
2	